$x = 3$: $p_o + 3p_1 + 0{,}25c_o + 0{,}75\, c_1 \geq 3$

$p_o + 3p_1 + 0{,}25c_o + 0{,}75\, c_1 \geq 5$

$x = 4$: $p_o + 4p_1 + 0{,}25c_o + c_1 \geq 4$

$p_o + 4p_1 + 0{,}25c_o + c_1 \geq 7$

$x = 6$: $p_o + 6p_1 + 0{,}25c_o + 1{,}5c_1 \geq 4$

$p_o + 6p_1 + 0{,}25c_o + 1{,}5c_1 \geq 5$

$p_o + 6p_1 + 0{,}25c_o + 1{,}5c_1 \geq 9$


dum samtempa minimumigo de la funkcio $Q(c_o, c_1) = 4c_o + 14c_1$. Per simpligo de tiu ĉi sistemo ni ricevos tabelon Tab. 2, jam uzeblan por solvo per iu el la metodoj de la lineara programado. Rezulta solvo de tiu ĉi tasko de minimumigo de funkcio Q sur la aro de permeseblaj valoroj por p_o, p_1 kaj nenegativaj c_o, c_1 estas sinsekve $Q_{min} = 58$, $p_o = p_1 = 1$, $c_o = 11$, $c_1 = 1$. Tiu ĉi modelo prognozas valoron de la variablo Y en la punkto $x = 5$ kiel triangulan svagan nombron $\underline{\widetilde{Y(5)}}$ (vidu Bildon 3) kun fidindeca funkcio donita per nombroj p_o, p_1, c_o, c_1 en la ĝenerala formo

$$\mu_Y(y) = 1 - \frac{|p_o + 5p_1 - y|}{c_o + 5c_1}, \text{ kiam } p_o + 5p_1 - c_o - 5c_1 \leq y \leq p_o + 5p_1 + c_o + 5c_1,$$
$$= 0; \text{ aliel;}$$

en nia kazo de

$$\mu_Y(y) = 1 - \frac{|6-y|}{16}; \ -10 \leq y \leq 22,$$
$$= 0; \text{ aliel.}$$

La "disŝmiriteco" de la rezulta svaga nombro estas granda.



Bildo 3. *Bildo de la svaga nombro* $\underline{Y}$*(5) por Ekzemplo 2.*

$X =$	p_0	p_1	c_0	c_1	signo	absoluta membro
1	1	1	-- 0,25	-- 0,25	≤	1
3	1	3	-- 0,25	-- 0,25	≤	3
4	1	4	-- 0,25	-- 0,25	≤	4
6	1	6	-- 0,25	-- 0,25	≤	4
1	1	1	0,25	0,25	≥	4
3	1	3	0,25	0,75	≥	5
4	1	4	0,25	1,00	≥	7
6	1	6	0,25	1,50	≥	9
Q =	**0**	**0**	**4**	**14**	minimumigo	

Tab. 2 *Tabelo por nombra solvo de la tasko de lineara programado el la Ekzemplo 2.*

3. La dua svaga modelo

Ni ankoraŭ pli ĝeneraligos niajn supozojn. Ĝis nun ni konsideris, ke la mezurata grando Y estas akra kaj ties stimo estas svaga nombro $\tilde{\underline{Y}}$. Nun ni supozos, ke ankaŭ la mezuritaj valoroj y_{ij} estas realigoj de la certa svaga nombro $\underline{Y}_i$ kun fidindeca funkcio (16):

$$\mu_{Y_i}(y) = 1 - \frac{|\bar{y}_i - y|}{e_i} \; ; e_i > 0; \text{ kiam } \bar{y}_i - e_i \le y \le \bar{y}_i + e_i$$

$$= 0 \; ; \text{ aliel.} \qquad (16)$$

(En (16) estas $\bar{y}_i$ aritma mezumo el la valoroj y_{ij} , $j = 1, 2, \dots, n_i$.)

Pozitiva valoro e_i difinas "precizecon" de mezurado de la grando Y. En la kazo, kiam ni estas mezurintaj por la certa valoro x_i pli da valoroj y_{ij} de la dua (elira) variablo Y, ni povas determini la konstanton e_i ekz. laŭ

$$e_i = max_j \, |y_{ij} - \bar{y}_i| \, , \; i = 1,2,\dots,N. \qquad (17)$$


Por la svaga eliro $\underline{Y}$ el la regresia ekvacio $\underline{Y} = \underline{A} + \underline{B}\,X$ ni poste havas la fidindecan funkcion (12). Svaga regresia stimo $\tilde{\underline{Y}}$ devas plenumi la kondiĉon por inkludo de α – sekcoj de svagigitaj eliraj valoroj $\underline{Y}_i$ kaj de la regresia stimo $\tilde{\underline{Y}}_i = \underline{A} + \underline{B}\,x_i$ en la formo

$$\underline{Y}_i^{\alpha_i} \subseteq \tilde{\underline{Y}}_i^{\alpha} \, , \text{ tj. } \alpha_i \ge \alpha \text{ por ĉiuj } i. \qquad (18)$$

La plej bona valoro α (ni strebas atingi la plej altan α) poste estas

$$\alpha = min_i\{\alpha_i\} \ . \qquad (19)$$

Ni tamen ankaŭ postulas, ke la “disŝmiriteco” de la regresia stimo estu laŭeble minimuma, do temas denove pri minimumigo de la funkcio (15), vidu Bildon 4.



Bildo 4. *Komento al la rilato (18). La nigra plena parto bildigas fidindecan funkcion de la svaga aro* $\underline{Y}_i$*, la malplena parto bildigas la svagan aron, kiu reprezentas valorojn de la svaga regresia funkcio* $\underline{\tilde{Y}}(x_i)$.

Se ni detaligas la kondiĉon (18) por la menciitaj α- sekcoj, ni havas por ĉiuj duopoj de la mezuritaj valoroj (x_i, y_{ij}) du tipojn de neekvacioj :

$$y_{ij} \geq p_o + p_1x_i - (1-\alpha)(c_o + c_1x_i) + (1-\alpha)e_i$$
$$y_{ij} \leq p_o + p_1x_i + (1-\alpha)(c_o + c_1x_i) - (1-\alpha)e_i \ ; \quad \text{por ĉiuj } i\,,j. \qquad (20)$$

La sistemon de neekvacioj (20) eblas simpligi al la formo (21):

$$min_j\{\,y_{ij}\} \geq p_o + p_1x_i - (1-\alpha)(c_o + c_1x_i) + (1-\alpha)e_i$$
$$max_j\{\,y_{ij}\} \leq p_o + p_1x_i + (1-\alpha)(c_o + c_1x_i) - (1-\alpha)e_i \ ; \quad \text{por ĉiuj } i\,. \qquad (21)$$

Denove temas pri tasko de lineara programado; sub kondiĉoj (12.21) ni serĉas minimumon de la funkcio Q(c_o, c_1). Jen konkreta ekzemplo:

Ekzemplo 3. Ni klopodu apliki la antaŭan teorion al la datoj el la Ekzemplo 1, vidu Tab. 1. Ĉar ni supozas, ke la mezuritaj eliraj valoroj estas realigoj de la triangulaj svagaj nombroj (16), ni unue determinas valorojn de iliaj parametroj e_i laŭ (17):

i = 1: $\overline{y}_1$ = 2,33; $e_1 = 1{,}67$

i = 2: $\overline{y}_2$ = 4,00; $e_2 = 1{,}00$

i = 3: $\overline{y}_3$ = 5,50; $e_3 = 1{,}50$

i = 4: $\overline{y}_4$ = 6,00; $e_4 =$ 3,00.

Same kiel en la antaŭaj kazoj ni elektas α = 0,75. Per substituo de datoj el la Tab. 1 ni ricevos sistemon de neekvacioj en la formo

$1 \geq p_o + p_1 - 0{,}25.\,(c_o + c_1) + 0{,}25\,.1{,}67$
$3 \geq p_o + 3p_1 - 0{,}25.\,(c_o + 3c_1) + 0{,}25\,.1{,}00$
$4 \geq p_o + 4p_1 - 0{,}25.\,(c_o + 4c_1) + 0{,}25\,.1{,}50$
$4 \geq p_o + 6p_1 - 0{,}25.\,(c_o + 6c_1) + 0{,}25\,.3{,}00$

$4 \leq p_o + p_1 + 0{,}25.\,(c_o + c_1) - 0{,}25\,.1{,}67$
$5 \leq p_o + 3p_1 + 0{,}25.\,(c_o + 3c_1) - 0{,}25\,.1{,}00$
$7 \leq p_o + 4p_1 + 0{,}25.\,(c_o + 4c_1) - 0{,}25\,.1{,}50$
$9 \leq p_o + 6p_1 + 0{,}25.\,(c_o + 6c_1) - 0{,}25\,.3{,}00$

Per solvo de tiu ĉi sistemo de neekvacioj (vidu ankaŭ Tab. 1) ni ricevos permeseblajn valorojn por p_o, p_1, c_o, c_1. Ni akiros el ili optimumajn valorojn per elekto de tiuj, kiuj minimumigas la funkcion Q = $4c_o + 14\, c_1$. Tio estas ĉe Q_{min} = 50 valoroj $p_o = p_1$ = 1; $c_o = 9$; c_1 = 1, kiuj deteminas $\widetilde{Y(5)}$ fidindecan funkcíon $\mu_Y(y)$ en la formo

$$\mu_Y(y) = 1 - \frac{|p_o + 5p_1 - y|}{c_o + 5c_1} = 1 - \frac{|6-y|}{14}, \text{ kiam } -8 \leq y \leq 20,$$
$$= 0; \text{ aliel;}$$

“Disŝmiriteco” de tiu ĉi svaga nombro estas iom malpli granda.

X =	p_o	p_1	c_o	c_1	signo	absoluta nombro
1	1	1	– 0,25	– 0,25	≤	0,58
3	1	3	– 0,25	– 0,75	≤	2,75
4	1	4	– 0,25	– 1,00	≤	3,63
6	1	6	– 0,25	– 1,50	≤	3,25
1	1	1	0,25	0,25	≥	4,42
3	1	3	0,25	0,75	≥	5,25
4	1	4	0,25	1,00	≥	7,38
6	1	6	0,25	1,50	≥	9,75
Q =	0	0	4	14	minimumigo	

Tab. 3. *Tabelo por solvo de la tasko de lineara programado el Ekzemplo 3.*

4. Konkludo

La du prezentitaj svagaj modeloj de la lineara regresio profitas de la grava kvalito de triangulaj svagaj nombroj (ilia lineara kombino estas denove svaga nombro). Per tio tamen limiĝas la ĝeneraleco de la metodo, ĉar tiamaniere eblas solvi nur problemojn, kie certas la supozo, ke la dependa grando havas ĉie la saman variablecon. La avantaĝo troviĝas en la eblo uzi laŭnormajn algoritmojn de la taskosolvo de lineara programado. La malavantaĝo estas alta "dissŝmiriteco" de tiaj svagaj stimoj.

Literaturo

Klir, G.J., Yuan, Bo (1995): *Fuzzy Sets and Fuzzy Logic*: *Theory and Applications*, Prentice Hall, Upper Saddle River

Kwakernaak, H. (1979): Fuzzy Random Variables I and II. *Inf.Sci. (USA)*, Vol. 15: 1－29, 1979

Ross, T.J. (2005): *Fuzzy logic with engeneering applications*, second edition, J.Wiley & Sons, Ltd., The Atrium, Southern Gate, Chichester, West Sussex PO 198SQ, England, June 2005

Viertl, R. (2006): Univariate Statistical Analysis with Fuzzy Data, *Computational Statistics & Data Analysis*, Vol.51, Issue 1, 2006, pp 133 – 147, ISSN: 0167 – 9473

Wang, G., Yhang, Y. (1992): The Theory of Fuzzy Stochastic Processes, *Fuzzy Sets and Systems,* Vol.51, pp 161 – 178, 1992, ISSN 0165 – 0114

Půlpán, Z. (2004): *K problematice zpracování empirických šetření v humanitních vědách*, Academia, Praha

Ricevita 2013–09–02

Adreso de la aŭtoro: Prof. RNDr. PhDr. Zdeněk Půlpán,CSc., Na Brně 1952/39, CZ-500 09, Hradec Králové 9, Zdenek.Pulpan@klikni.cz

Is the simple fuzzy set model useable mathematical remedy? (Summary)

We present solutions of the problem of fuzzy linear regression. We use the principles of fuzzy set theory to solve problems of estimating the linear dependence of the output variable Y on the input variables X. We assume the input variable X as the fuzzy variable, but with the "real" value, measured with greater accuracy than the output variable Y, which is fuzzyficated. To resolve this issue, we consider the possibilities in which we formally extend the situation gradually to the situation where the variables A, B, Y are represented as triangular fuzzy numbers in the model of linear relationship $Y = A + BX$.

grkg / Humankybernetik
Band 54 · Heft 4 (2013)
Akademia Libroservo / IfK

Das Eine und das Andere

von Alfred TOTH, Tucson (USA)

1. Eine ältere, einer Grundlegung der theoretischen Logik entstammende Definition des Zeichens lautet: "Unter Zeichen (signum) im Allgemeinen verstehen wir alles dasjenige, wodurch wir zur Erkenntniß eines Anderen gelangen, oder was uns zur Erkenntnis eines Anderen führt (Stöckl 1869, S. 236), vgl. Toth (2013). Das Andere steht hier im Gegensatz zum Einen, das ein Objekt sein kann, aber nicht das Objekt sein muß, das zum Zeichen erklärt wurde, welches uns über dieses Andere belehrt. Trotzdem ist im zweiwertigen Gegensatz [das Eine/das Andere] das Zeichen natürlich immer auch das Andere für das Eine des Objektes, für das ein Zeichen thetisch eingeführt wurde. Im Falle der Logik lautet der zweiwertige Gegensatz bekanntlich [Position/ Negation] bzw. [Sein/Nichts], und eine einfache Spiegelungsoperation, die ebenfalls zweiwertige Negation, bildet die Elemente dieser Gegensätze in unendlichem Zyklus aufeinander ab, ohne daß dabei etwas Neues entsteht, das die Grenzen der Basisdichotomie [das Eine/das Andere] sprengt.

2. Die in der Logik kaum je gestellte Frage muß jedoch lauten:

2.1. Welcher Art ist das Objekt, das in ein Nichtobjekt verkehrt wird, aus dem durch wiederholte Anwendung der Negation wieder das Objekt entsteht? Oder anders gefragt: Um was für einen ontischen Raum handelt es sich beim "Sein", ein Begriff, der ja losgelöst von einem Objektbegriff vollkommen sinnlos ist? Damit hängt eine weitere, ebenfalls m.W. bis heute nicht befriedigend beantwortete Frage zusammen:

2.2. Wenn die Logik auf einem zweiwertigen Gegensatz [Sein/Nichts] beruht, wie kann es dann sein, daß sowohl das Zeichen als auch das Subjekt, ohne das es ja schließlich keine Logik gibt und welches die Negationsoperation durchführt, in den Kontexturbereich des Nichts gehört, obwohl es doch, wenigstens ontologisch betrachtet, natürlich ein Objekt ist, also zum positiven, realen ontischen Raum gehört?

Weitere Fragen ergeben sich dann, wenn man innerhalb der Ontologie zwischen Sein und Seiendem einerseits und zwischen Nichts und Nichtseiendem andererseits differenziert, d.h. also, statt von einem von zwei zweiwertigen Gegensätzen ausgeht:

2.3. Um welches Objekt handelt es sich bei demjenigen, welches das Sein und bei demjenigen, welches das Seiende konstituiert? Wie kann mit Hilfe der doch einzigen und nicht-differenzierbaren zweiwertigen Negation Sein auf Seiendes (bzw. vice versa), Nichts auf Nichtseiendes (bzw. vice versa) abgebildet werden, und wie können die

Abbildungen zwischen den beiden Gegensätzen, wiederum mit der einzigen Negation, vollzogen werden?

Jedenfalls dürfte klar sein, daß wir es hier mit zwei ontischen Räumen – demjenigen des Seins und demjenigen des Seienden – und um zwei "meontische" Räume – demjenigen des Nichts und demjenigen des Nichtseienden – zu tun haben. Interessant ist von dieser Unterscheidung her, daß für Bense die Negation "das Nicht des Nichtseienden" betrifft (1952, S. 80), daß also die Negation nicht etwa auf der Ebene des objektiven Gegensatzes [Sein/Nichts], sondern auf derjenigen des subjektiven Gegensatzes [Seiendes/Nichtseiendes] operiert. Entsprechend gehört für ihn auf das Zeichen zum Kontexturbereich des Nichtseienden (Bense 1952, S. 79). Es geht somit nicht an, mit Hilfe einer einzigen zweiwertigen Negation die folgenden vier verschiedenen Abbildungen vorzunehmen, davon abgesehen, daß in der folgenden Tabelle die horizontalen Abbildungen gar keine Negationen sind, so daß ein Operator für sie in der zweiwertigen Logik fehlt:

Sein $\rightarrow_1$ Seiendes
$\downarrow N^1$ $\downarrow N^2$
Nichts $\rightarrow_1$ Nichtseiendes.

Mindestens mathematisch gesehen, ist es unstatthaft, diese Unterscheidung auf den einfachen Gegensatz [Position/Negation] zurückzuführen und sie durch Vermengung von Logik und Ontologie als "Interpretationen" dieses einfachen Gegensatzes zu "erklären". Will man diese Interpretationen innerhalb der Logik formalisieren, gehören sie in die Modelltheorie und überschreiten damit beträchtlich die Grundlagen der Aussagenlogik, aber auch in diesem Fall ändert sich nichts daran, daß diese Tabelle zwei völlig verschiedene Objektbegriffe für die beiden ontischen Kontexturen, zwei verschiedene Negationen, und zwei verschiedene meontische Kontexturen voraussetzt und daß ferner die Abbildungen zwischen den ontischen Kontexturen einerseits und zwischen den meontischen Kontexturen andererseits in der klassischen Logik nicht vorhanden sind. Die klassische Logik ist somit gegenüber der klassischen Ontologie defizitär.

3.1. Das wohl bedeutendste, an diese Fragen unmittelbar anknüpfende Problem betrifft aber die Natur der Abbildung von Wahrheitswerten: Worauf werden diese denn abgebildet? Z.B. liest man bei Menne: "Eine Aussage ist wahr, wenn sie mit dem intendierten Sachverhalt übereinstimmt" (1991, S. 25). Doch was ist ein "intendierter Sachverhalt"? Jedenfalls handelt es sich ontologisch um ein irgendwie geartetes Objekt. Können aber Wahrheitswerte sowohl auf Objekte des ontischen Kontexturbereichs des Seins als auch auf Objekte des ontischen Kontexturbereichs des Seienden abgebildet werden? Da das Zeichen nach Bense zum meontischen Kontexturbereich des Nichtseienden gehört, folgt, die Richtigkeit dieses Satzes vorausgesetzt, daß Wahrheitswerte nur im nachstehend markierten Teil unserer Tabelle operieren.

Sein	$\rightarrow_1$	Seiendes
$\downarrow N^1$		$\downarrow N^2$
Nichts	$\rightarrow_2$	Nichtseiendes.

Daraus folgt dann aber sofort, daß die Logik nicht die objektiven, in der Tabelle links stehenden, Kontexturbereiche, sondern nur die subjektiven, in der Tabelle rechts stehenden Kontexturbereiche zu ihrem Gegenstand hat. Das paßt insofern zu Mennes Definition der Wahrheitswertabbildung, als von Intention natürlich nur dann gesprochen werden kann, wenn Subjekte involviert sind.

3.2. Nach unseren bisherigen Erkenntnissen können wir unsere Tabelle also wie folgt schreiben

$$\begin{array}{lll} [\Omega_\Omega] & \rightarrow_1 & [\Omega_\Sigma] \\ \downarrow_3 & & \downarrow_4 \\ [\Sigma_\Omega] & \rightarrow_2 & [\Sigma_\Sigma] \end{array}$$

Die vier Abbildungen sind also, informell ausgedrückt:

$\rightarrow_1$: bildet das objektive Objekt auf das subjektive Objekt ab
$\rightarrow_2$: bildet das objektive Subjekt auf das subjektive Subjekt ab
$\rightarrow_3$: bildet das objektive Objekt auf das objektive Subjekt ab
$\rightarrow_4$: bildet das subjektive Objekt auf das subjektive Subjekt ab

Und die Zugehörigkeit der zwei Objekte und der zwei Subjekte zu den vier Kontexturbereichen sind somit:

objektives Objekt: Kontexturbereich des Seins
subjektive Objekt: Kontexturbereich des Seienden
objektives Subjekt: Kontexturbereich des Nichts
subjektives Subjekt: Kontexturbereich des Nichtseienden.

3.3. An dieser Stelle tut sich nun ein weiteres bedeutendes Problem auf, das man in Form der Frage formulieren kann: Welcher Art sind die in der nachstehenden, wiederum modifizierten Tabelle eingezeichneten kontexturellen Grenzen?

$$\begin{array}{lll} [\Omega_\Omega] & \|_1 & [\Omega_\Sigma] \\ \|_3 & & \|_4 \\ [\Sigma_\Omega] & \|_2 & [\Sigma_\Sigma] \end{array}$$

Wie man aus dem Vergleich dieser mit der letzten Tabelle ersieht, sind die beiden horizontalen Grenzen solche, die zwischen den beiden Objekten bzw. zwischen den

beiden Subjekten bestehen, während die beiden vertikalen Grenzen solche sind, welche die in der klassischen Logik einzige Objekt-Subjekt-Grenze in zwei Grenzen aufspalten. Es muß hier also betont werden, daß die auch für polykontexturale Logik weiterhin bestehende Einzigartigkeit der Objekt-Subjektgrenze in unserer letzten Tabelle aufgehoben ist. Anders auzsgedrückt: Während die polykontexturale Logik ein Verbund- bzw. Distributionssystem zweiwertiger Logiken darstellt, für die durchwegs die Unitarität der Kontexturgrenze zwischen Subjekt und Objekt gilt, ist diese in unserer logischen Konzeption zugunsten einer Vierfachheit qualitativ verschiedener Kontexturgrenzen aufgehoben. An die Stelle von Transoperatoren, welche in der polykontexturalen Logik zwischen den zweiwertigen Logiken vermitteln, vermitteln in unserer logischen Konzeption zwei kontexturell geschiedene Negatoren den unitären Objekt-Subjekt-Gegensatz und in völliger neuer Weise zwei weitere kontexturell geschiedene Operatoren den weder in der klassischen noch in der polykontexturalen Logik vorhandenen bzw. operationalisierten Gegensatz zwischen objektivem und subjektivem Objekt einerseits und objektivem und subjektivem Subjekt andererseits.

Schrifttum

Bense, Max (1952): *Die Theorie Kafkas*, Köln

Menne, Albert (1991): *Einführung in die formale Logik*, 2. Aufl, Darmstadt

Toth, Alfred (2013): *Das Zeichen als Mittel zur Erkenntnis des Anderen.* In: Electronic Journal for Mathematical Semiotics, 2013

Stöckl, Albert (1869): *Lehrbuch der Philsophie,* Bd. I, 2. Aufl, Mainz

Eingegangen 2013 – 06 – 14

Anschrift des Verfassers: Prof. Dr. Alfred Toth, 8225 East Speedway, Apt. 1013, Tucson, AZ 85710, USA

The one and the other sides (Summary)

So far, Sein and Seiendes on the one side and Nichts and Nichtseiendes on the other side have been in the focus on ontology, but not of logic. The present article shows a way of logical formalization of a 4-partite ontological/ meontological as well as semiotical basis for logic.

grkg / Humankybernetik
Band 54 · Heft 4 (2013)
Akademia Libroservo / IfK

Lingvopolitiko kaj interslavismo de Ladislav Podmele

de Věra BARANDOVSKÁ-FRANK, Paderborn (DE)

La slava lingvofamilio posedis komunan skriblingvon, la t.n. eklezian malnovslavan, ekde la naŭa jarcento. Ĝia historio komenciĝas kun la misio de makedonaj fratoj Konstantino (Kirilo) kaj Metodo en la jaro 863 al la Grandmoravia Regno, kies princo Rastislav deziris kristanigon en lingvo, komprenebla al lia popolo (ĝis tiam estis uzata la Latina). Konstantin kreis por tiu ĉi origine makedonslava dialekto skribon, kiu ebligis disvastigon de tekstoj al okcidentaj slavoj; simila, verŝajne de liaj disĉiploj kreita skribo ĝis nun uzatas ĉe orientaj kaj sudaj slavoj. La eklezia malnovslava estas konsiderata planlingvo, en la senco de planado de korpuso kaj statuso (vidu Janich, 2004, p. 482-483) kaj ĝi ludis gravan lingvopolitikan rolon en la tiel nomata *panslavismo*, t. e. kultura, religia, socia/etna kaj nacia/politika konsciiĝo de komuneco de ĉiuj slavoj.


La periodo de renesanco kaj humanismo estas karakteriza per komenco de lingvokreado (enkadre de lingvofilozofio) ĝenerale, kaj ĉi-konekte ankaŭ pri lingvopolitikaj interesoj. Ekde la 17-a jc. konatas ankaŭ projektoj de panslavaj planlingvoj, kiuj jam per siaj nomoj kiel “tutslava”, “ĝeneralslava”, “komunslava”, “universala slava” aŭ per diversaj variantoj de la vorto “slava” mem indikas, ke ili volas servi al reciproka interkompreniĝo de ĉiuj slavaj popoloj. Iliaj fontoj estis unuflanke la eklezia (malnov- kaj novslava) lingvo, aliflanke la rusa kiel la plej granda slava lingvo, kaj/aŭ diversaj kombinoj, inkludantaj ankaŭ komunaĵojn en la plej grandaj slavaj lingvoj (la liston vidu ĉe Duliĉenko 1990 kaj Duliĉenko 2010, p. 207) La panslava lingvokreado, kun identaj tendencoj, praktike daŭras ĝis nun, la projektoj nur laŭmode nomiĝas “slaviconlangs” (la liston vidu ekz. sur la paĝo por slaviconlangs de lingvisto Jan van Steenbergen sub http://steen.free.fr/slovianski/constructed_slavic_languages.html). Ne mankas tie la *lingvopolitika komponanto*, antaŭvidanta plifortigon de komunslava elemento precipe en Eŭropo.

Unu el la projektoj, ekestintaj inter 1954-1958, estis *Mežduslavjanski jezik* (“Interslava lingvo”) kreita de grupo da ĉeĥoj[1], al kiuj apartenis poeto Ladislav Podmele (1920-2000). Kvankam, krom la lingvoprojekto mem, ekzistis pluraj manuskriptoj en tiu ĉi lingvo (vidu Duliĉenko 1990, p. 301), oni ne trovis ilin en la postlasaĵo de Podmele; kiam mi mem alparolis lin pri la afero en la naŭdekaj jaroj (tiam li jam estis esperantisto), li elturniĝis, dirante ke temis nur pri “intelekta amuzo de junuloj”.

La tekstospecimeno, publikigita ĉe Duliĉenko (1990, p. 301), estas rakonto pri epizodo koncernanta la supre menciitan ekeston de la eklezia malnovslava lingvo, nome la alvenon de la senditoj de Rastislav el Grandmoravia Regno al la bizanca imperiestro Michail. La elekto de la temo povus esti pruvo de tio, ke panslavismaj ideoj estis daŭre aktualaj dum la kreado de novaj projektoj, sed krome ne estis konataj eksplicite lingvo-

[1] Podmele L., Petr J., Podobský J., Příhoda V., Borovka, S., Trnka B., Stuchlík A. – vidu Duliĉenko 1990, p. 301

politikaj aludoj al slavismo el la plumo de Podmele. Des pli surpriza estis trovo de lia manuskripto « Revolucija v istoriji interlingvistiki », verkita en Mežduslavjanski jezik kaj enhavanta ideojn, kiuj, en siaj principoj, estas hodiaŭ daŭre/denove aktualaj. Por kompreni la fonon, utilas konatiĝi kun la biografio de Podmele (konata pli bone sub sia plumnomo Jiří Karen). Publikigis ĝin i.a. Čestmír Vidman (2000) kiel nekrologon en „Starto“ (vidu http://www.volny.cz/malovec/start300.htm) kaj Vikipedio (http://eo.wikipedia.org/wiki/Jiří _Karen), en ambaŭ kazoj akompanate de detala listo de liaj poeziaj kolektoj.



Ladislav Podmele naskiĝis la 11-an de junio 1920 en Litomyšl kaj mortis la 30-an de aprilo 2000 en Prago. Li lernis metion de librovendisto en Vysoké Mýto, poste studis en klasika gimnazio en Hradec Králové. Dum la okupacio li estis komande laborigita en Magdeburgo kaj Nordhauseno. Post la milito li studis historion kaj filozofion en Karola Universitato en Prago. Li praktikis kiel edukisto de laborista junularo, poste laboris kiel gimnazia instruisto kaj docento de la praga Instituto por Plua Edukado de Instruistoj kaj de Esplor-Instituto de Faka Instruado.
Liaj unuopaj poemoj kaj rakontoj publikiĝis ekde lia junaĝo en ĉeĥaj gazetoj sub diversaj plumnomoj, plej ofte Jiří Karen[2]. Sub la propra nomo Ladislav Podmele li publikigis fakajn pedagogiajn verkojn, ekz. “Metodická příručka k dějinám starověku” (Metodika manlibro pri historio de la antikva epoko, 1955), “Pověrečné a naivní myšlení jako teoretický problém” (Superstiĉa kaj naiva pensado kiel teoria problemo, 1969) k.a.. En 1976 li pro kormalsano devis forlasi sian laborlokon kaj ekde tiam li plene dediĉis sin al verkado de poemoj kaj al Esperanto, kiun li komencis lerni en 1974.

Podmele sub sia plumnomo Jiří Karen eldonis 17 ĉeĥlingvajn poemkolektojn (du aliaj eldoniĝis postmorte), el kiuj du aperis en la germana traduko („Bevor die neunte Welle“, trad. Ludvík Kundera, „Ein kleines Licht im Dunkeln“, trad. Jan Kühmeier) kaj tri en Esperanta traduko: “Flugilhava ŝtono”(trad. Jiří Kořínek), “Antaŭ la naŭa ondo” (trad. Rikardo Ŝulco), “Mondo afabla ne nur je vortoj” (trad. Jaroslav Mráz). Poste li verkis rekte en Esperanto, ekz. “Eternaj revuloj“ (2-a loko en Belartaj Konkursoj 1980) kaj “Kantoj de vaganto sur planedo Ĝoja Ĝojmalo” (1996). Li krome esperantigis la romanon “La plej eminenta inter Pierotoj” de František Kožík (kun Josef Vondroušek), eldonis la broŝuron “Poeto ne mortas” kaj kontribuis per tradukoj el la ĉeĥa literaturo al la gazeto “Paco”. Liaj originale verkitaj poemoj aperis dise tra Esperantujo, i.a. en la kolekto “Kvarfolio” kun aliaj aŭtoroj de la Praga skolo (1985), ofte ankaŭ en “Fonto”. Li krome verkis fakajn artikolojn pri etiko kaj literaturo, i.a. "Pri falsa konscio kaj mistifiko," Filozofia revuo Simpozio, n-ro 3, marto 1984, p. 26-29, kaj “Kiuj kaj kiucele estas Praganoj” (analizo de la Praga skolo en poezio, La Chaux-de-Fonds 1989). En 2007 eldoniĝis en Toruń lia verko “Esperantozofio” pri strategio organizi E-movadon, pri kio li jam 1991 verkis broŝuron “Ŝancoj de Esperanto en centra Eŭropo”.

[2] “Jiří” estis antaŭnomo de la ĉeĥa poeto Wolker, kiun Podmele ŝatis, „Karen“ estas aludo al „Anna Karenina“

Malpli konatas, ke antaŭ ol konvertiĝi al Esperanto, Podmele engaĝiĝis lingve kaj movade por Occidental/Interlingue[3] kaj Interlingua. Je tiu okazo li ankaŭ konatiĝis kun okcidentalistoj Jaroslav Podobský, Stanislav Borovka kaj Jan Svatopluk Petr, kunaŭtoroj de Meždusiavjanski jezik, ili do jam havis spertojn kaj konojn pri planlingvoj, kiuj baziĝis sur internaciismoj. Podobský, ĉeĥa patriota poeto, instruisto de la rusa lingvo, regis plurajn eŭropajn lingvojn, junaĝe lernis Esperanton kaj Idon kaj krome okupiĝis pri aliaj planlingvoj kiel Latino sine flexione kaj Novial. Sub influo de Podobský aktivis Podmele en Occidental/Interlingue-movado jam dum siaj studentaj jaroj kaj transprenis en 1947 ties informburoon en Prago. Li ankaŭ verkis poemojn kaj tradukojn el la ĉeĥa en Occidental, proponante memstaran literaturan sekcion ene de la movado. Ĝis la jaro 1958 li apartenis al la redakcia stabo de "Cosmoglotta"[4] kaj al la plej elstaraj ĉeĥaj aktivistoj. En tiu tempo disvastiĝis en Eŭropo ankaŭ Interlingua de IALA[5], kiu estas tre simila al Occidental/Interlingue, sed imponas ĉefe al intelektulaj uzantoj per tio, ke ĝi estis kreita de organizaĵo kuniganta famajn lingvistojn. Podmele, same kiel lia amiko Podobský, transiris al Interlingua kaj iĝis membro de Union Mondial pro Interlingua, al kiu Podobský apartenis ĝis sia morto en 1962. Necesas aldoni, ke la movado por Interlingue, "surmerkatigata" en Ĉeĥoslovakio kiel verko de rusia-sovetia civitano Edgar Wahl, ne havis en la kvindekaj jaroj politikajn problemojn, aperadis revuo "Jazyk mezinárodní", lernolibroj kaj broŝuroj, dum la Esperanto-movada organizaĵo "Svaz českých esperantistů" estis likvidita kaj ĝia posteulo Ĉeĥa Esperanto-Asocio fondiĝis nur en 1969.

La spertoj kun Occidental/Interlingue kaj Interlingua/IALA eble influis la ellaboron de Meždusiavjanski jezik en tiu senco, ke ties bazo iĝis internaciismoj: sur la unua nivelo tiuj, kiuj komunas en la plej multaj slavaj lingvoj, kaj, se tie ne regas unueco, Meždusiavjanski jezik transprenas internaciismojn eŭropajn – latindevenajn kaj/aŭ grekdevenajn. En la vortprovizo de la sube reproduktita teksto troviĝas ĉ. 30% da tiaj internaciismoj, interalie: aksiom, dialektik, dialekt, ekonomika, element, ergo, etap, experiment, fakt, forma, fundament, idealist, idealizm, interes, kapitalist, kolektiv, komunist, magazin, material, materialist, orient, perfekt, period, perspektiva, praktika, primitiv, problem, proces, produkt, program, projekt, racional, rezultat, sistem, sintezis, standard, struktura, technika, teorija, tezis, univerzal, utopija, zona.

La artikolo « Revolucija v istoriji interlingvistiki » ne estas datita, sed ĝia ekesto en la kvindekaj jaroj estas tre probabla, pro tipaj politikaj aludoj. Socialisma Ĉeĥoslovakio tiam staris sub la influo de Sovetunio, kiu havis spertojn kun lingvokonstruado (jazykovoje stroitěľstvo) konekte al normigo kaj alfabetigo de siaj multnombraj etnolingvoj. Kiel trafe diras Mannewitz (2010, p. 94), „la scienc-historia problemo de tiu epoko tamen enestis en ĝenerale granda ideologigo kaj politikigo de ĉio socie relevanta." Tial ekestis, kontraste al "burĝa/kapitalisma" historia esploro de hindeŭropaj lingvoj, la "nova lingva instruteorio" de *Nikolaj Jakovleviĉ Marr* (1865-1934), kiu aplikis la marksis-

[3] Occidental en 1949 alinomiĝis al Interlingue, ĉar ĝia bazo, eŭrop-okcidentaj lingvoj, ekhavis negativan konotacion kun kapitalismo, neakceptebla en orienta Eŭropo.
[4] la oficiala organo de Occidental/Interlingue-Union
[5] International Auxiliary Language Association, 1924-1951

man filozofion (dialektikan materialismon) al lingvistiko asertante, ke la lingvo havas klasan karakteron, ke ekzistas lingvoj de ekspluatantoj kaj ekspluatatoj (= de kapitalistoj kaj proletaro). Li prezentis t.n. jafetidan teorion pri origino, evoluado kaj estonteco de homa lingvo, laŭ kiu, male al ĝistiamaj opinioj, lingvoj ne havis komunan originon, sed kolektiĝis el diversaj lokoj per interkruciĝo kaj interfluo (komp. ekz. Lawrence, 1957). Krome, laŭ Marr, ĉiuj lingvoj estas artefaritaj de la homoj, ili respegulas klasbatalon de la homa socio kaj tendencas al unu tutmonda lingvo, kiu enhavos elementojn el ĉiuj lingvoj de la mondo. La futura tuthomara lingvo devas esti artefarita kaj ĝi estos „lingvo de nova sistemo, tute speciala, ĝis nun ne ekzistanta“. En 1929 aperis pri tiu teorio skizo “Revolucio en la lingvoscienco” de Andrej Petroviĉ Andrejev, al kiu kvazaŭ estus aludanta la titolo de la koncerna eseo de Podmele (vidu http://eo.wikipedia.org/wiki/Revolucio_en_la_lingvoscienco). Pri lingvistiko interesiĝis kaj skribis ankaŭ la tiama sovetia ŝtatprezidanto Josip Visarionoviĉ Stalin, kiu antaŭvidis la Rusan kiel “zonan lingvon” por orienta Eŭropo. Antaŭ la tutmonda venko de socialismo devintus ekesti unuecaj zonaj lingvoj, kiuj poste kunfandiĝus al unu komuna internacia (vidu Meissner 1977, p. 110).

La marksisma lingvoteorio de Marr – *marrismo* – estis proklamata la plej moderna kaj ĝusta lingvoscienco kaj instruata en universitatoj, kompreneble ankaŭ en Ĉeĥoslovakio en la tempo, kiam Podmele faris siajn studojn en la Karola Universitato en Prago. Kvankam Stalin oficiale distanciĝis de la marrismo jam en la jaro 1950, la nova generacio de lingvistoj – kaj konsekvence ĉiuj, kiuj interesiĝis pri lingvokonstruado – dum iom da tempo ankoraŭ estis sub ĝia influo, sendepende de tio, ĉu ili kredis al ĝia politika enhavo aŭ nur simple opiniis ĝin la plej moderna. Kiel ni vidos, eblis ĝin eĉ adapti al la “malnovaj” scioj pri komuna origino de hindeŭropaj lingvoj. Krome, planlingvoj povis kun marrismo certagrade harmonii (onidire Marr eĉ pretis akcepti Esperanton kiel portempan solvon). Sub tiu aspekto oni do legu la tekston de Podmele kaj ne miru pri esprimoj kiel “gvida rolo de la komunisma partio”, “kulturaj laboristoj” kaj “proletaraj amasoj”. (La Esperanto-traduko estas intence laŭvorta, do malmulte eleganta, por ke oni povu pli bone kompari ĝin kun la originalo.)

Revolucija v istoriji interlingvistiki

Tezisi napisani v mežduslavjanskim jeziku

Do tego času bila aktivnost za meždunarodni jezik osnovana na principach utopizma, jež ždal si jedinego jezika za ves mir bez vzgleda na fakt, čto taki jezik ne može bit v nikakim pripadu rezultatem realnego razvoja jezikov živich, čto on bude vsegda tolika *vidumana*, spekulativna *konstrukcija*. Ibo jest realni fakt, čto odlišnost jezikov vsegomira jest taka, čto nemožno urobit jedinego jezika, jež bil bi vsem ludim srozumitelni, eto znači *realni.* Pozdviženija za meždunarodni jeziki izkustveni (kak volapük, esperanto, ido, novial) ne znala istorickego i naukovego fundamenta svoji aktivnosti, ich aktivnost ne bila v

Revolucio en historio de interlingvistiko

Tezoj skribitaj en interslava lingvo

Ĝis nun estis aktiveco por internacia lingvo organizita sur principoj de utopismo, kiu deziris unu lingvon por la tuta mondo sen rigardo al la fakto, ke tia lingvo povas en neniu kazo rezulti el reala evoluo de vivaj lingvoj, ke ĝi estos ĉiam nur *elpensita*, spekulativa *konstruaĵo*. Ĉar reala estas la fakto, ke diferenco de tutmondaj lingvoj estas tia, ke ne eblas fari unu lingvon, kiu estus por ĉiuj homoj komprebnebla, tio signifas *reala*. Movadoj por internaciaj artefaritaj lingvoj (kiel Volapük, Esperanto, Ido, Novial) ne konis historian kaj sciencan fundamenton de sia aktiveco, ilia aktiveco ne estis en akordo kun rezultoj de lingvo-

suglasiju s rezultatami nauk jezikovich i tože ne priimala jezik kak prostredek socialnego charaktera, no toliko kak svobodno ustrojemu *konvenciju*, jež jest možno kak kto to žela izmjenit, pretvorit, čto možno material živich jezikov fantasticki otrazit.

Ne, *jezik ne jest svobodna konvencija*, on jest produkt socialnego naživanija mas, naciji. Etot produkt podržen zakonem vznikanija, razvoja. Straniki izkustvenich meždunarodnich jezikov priimali dalše kak aksiom svoji aktivnosti kritiku živich jezikov. Argumentovali, čto živi jeziki mnogo težki na osvojenije, da oni su nelogicki, da proletariatu, narodu, ludu jest potrebni taki jezik, jež bil bi *legki k izučeniju*.

Na osnovach etich progrešnich teorij, oni želali ustrojit jeziki, jež su, pravda, logicki i pravidelni, regularni, no, tože su *schemata,* jež ne mogu bit v suglasiju s zakonami jezikovego razvoja. Eti straniki govorili, da živi jeziki robi trudnim dogovor meždu robotnikami vsegomira, da oni težki, da proletarijatu ne jest možno izučit jezik ruski, anglicki, ispanski i dalši jeziki mugutno rasprostraneni. Kak eto bi bila pravda, propagacija tego jezika značila bi, da kultura znanija živich jezikov bila bi uničena, no eto ne može bit programem komunistickich stran, jež ne mogu predložit masam svojich nacij fantaziji, ibo im jest treba predložit toliko eto, čto otraženijem realnich uslovij žitija socialnego. I jeziki živi su takim faktem, jež *nemožno svobodno premjenit*. Iz vsech etich pričin mi proti jezikum iskustvenim i dalše proti jedinemu, univerzalnemu jeziku v danich uslovijach, v danim etapu socialnego naživanija občini ludski.

No, može eto značit, da usilije ulegčit vzaimo srazumivat se naciajm različnich jezikov kak naukovi problem jest v svoich osnovach fantasticki? Ne možno tako dumat. Ibo, robotniki vsegomira usilno želaju, da bi jestvovala možnost srazumenija za masi. Ibo legče srazumivat se v borbe proti kapitalistam vsegomira znači - imjet možnost predavat znanija v oblasti produkciji, techniki, kulturi itd drugim i legko takich znanij priimat ot drugich. Vse, čto može realno ulegčit srazumenije mas, može bit, no potrebuje bit sledovano komunistami s velikim usilijem i interesem. No, toliko to, čto jest *objektivno* realnim pomaganijem proletarijata i ne to, čto utopisticke, idealisticke, metafizicke razrešenije.

sciencoj kaj ankaŭ ne akceptis lingvon kiel rimedon kun socia karaktero, sed nur kiel libere konstruitan *konvencion*, kiun eblas laŭplaĉe ŝanĝi, transformi, ke eblas la materialon de vivaj lingvoj esprimi fantazie.

Ne, *lingvo ne estas libera konvencio*, ĝi estas produkto de socia uzado de amasoj, de nacio. Tiu produkto estas subtenata per leĝo de deveno, de evoluo. Favorantoj de artefaritaj internaciaj lingvoj akceptadis poste kiel aksiomon de sia aktiveco kritikon de vivaj lingvoj. Ili argumentis, ke vivaj lingvoj estas tre malfacilaj por alproprigo, ke ili estas nelogikaj, ke por proletaro, nacio, popolo bezonatas tia lingvo, kiu estus *facile lernebla.*

Surbaze de tiuj progresemaj teorioj, ili deziris konstrui lingvojn, kiuj estas, vere, logikaj kaj regulaj, sed ili ankaŭ estas *skemoj*, kiuj ne povas esti en akordo kun leĝoj de lingva evoluo. Tiuj favorantoj diris, ke vivaj lingvoj molestigas interparolon inter laboristoj de la tuta mondo, ke ili estas malfacilaj, ke la proletaro ne kapablas ellerni lingvojn rusan, anglan, hispanan kaj aliajn multege disvastiĝintajn lingvojn. Se tio estus vero, la propagado de tia ligvo signifus, ke la kulturo de scipovo de vivaj lingvoj estus detruita, sed tio ne povas esti programo de komunismaj partioj, kiuj ne povas oferti al amasoj de siaj nacioj fantaziaĵojn, ĉar ili devas oferti nur tion, kio estas esprimo de realaj kondiĉoj de socia vivo. Kaj vivaj lingvoj estas tia fakto, kiun *ne eblas libere ŝanĝi*. Pro ĉiuj tiuj kialoj ni estas kontraŭ artefaritaj lingvoj kaj plue kontraŭ ununura, universala lingvo en konkretaj kondiĉoj, en konkreta etapo de socia vivo de homa komunumo.

Sed, ĉu tio povas signifi, ke la strebo faciligi reciprokan interkompreniĝon por nacioj kun diversaj lingvoj estas kiel scienca problemo esence fantaziaĵo? Ne eblas pensi tiel. Ĉar, laboristoj de la tuta mondo deziras, ke ekzistu eblo de interkompreniĝo por amasoj. Ĉar pli facile interkompreniĝi en batalo kontraŭ kapitalistoj de la tuta mondo signifas – havi eblon transdonadi sciojn en la kampo de produktado, tekniko, kulturo ktp. al aliaj kaj facile ricevadi tiajn sciojn de aliaj. Ĉio, kio povas reale faciligi interkompreniĝon de amasoj, povas ekzisti, sed ĝi bezonas esti observata de komunistoj kun granda diligenteco kaj intereso. Sed, nur tio, kio estas *objektiva*, estas reala helpo por proletaro, kaj ne tio, kio estas utopia, idealisma, metafizika solvo.

I jednim iz realnich metod, kak ulegčit dogovor meždu robotnikami različnich nacij i jezikov jest: učit se nejbolše važnim jezikem realnim kak na primjer: jezik ruski, jezik anglicki, ispanski, hindski, činski, arabski, japonski, malajski. Eto znači, da v uslovijach socialnego života naši etapy realno jest, da bi masi učili se etim glavnim jezikam vsegomira. Vse, čto realno pomaga temu cilu jest progresivne i vse, čto zabrana realizovanija tego cila, reakcionne i namjereno objektivno proti cilam proletariata. Straniki izkustvenich jezikov (volapükisti, esperantisti, idisti) budu govorit: izučenije izkustvenich jezikov pomoga proletarijatu, ibo eti jeziki su otrazem živich jezikov, su kombinaciji elementov etich jezikov. No, jasno, da naukovi punkt zrenija mira komunisticki partiji dlužen skazat: *ne akekoliv* otraženije živich jezikov ugodne iz materialistickego i dialektickego punkta zrenija. Take otraženije realnosti jezikov živich, jež jma črti *metafisiki, vulgarizaciji, schematizaciji i idealizma*, ne može bit priimano kak razrešenije problema.

I kak jasno, čto v dalekich perspektivach razvoja ludstva jedini jezik vsegomira velevažna gipoteza, tože jasno, da v uslovijach naši socialni realnosti ne jest uslovij za taki jezik jedini. I kak jest fakt, čto germanski, slavjanski, indo-iranski jeziki imjeju jedine pochodenije iz jezika praindoevropskego, jasno, da eti grupi jezikovi su tako otlišeni v realnosti, čto tože govorit o jedinim jeziku za vsi indo-evropany toliko fantazija. No, vidno, čto vzaimna srozumitelnost jezikov slavjanskich vzaimno, jezikov romanskich vzaimno uže važnim faktem, jež mog bi imjet važne značenije v rešeniju problema srazumivanija nacij i proletariatov. Kak bilo bi možne, da bi otraz etich vzaimno pribuznich jezikov bil naukovi i ne fantasticki, kak eta sinteza živich jezikov bila bi veleugodnim prostredkem kako ulegčit znanije živich jezikov - ibo toliko eto može bit cil našego usilija - eta gipoteza zonalnich jezikov *standardizovanich, kodifikovanich*, *naučno i estetično obrabotanich*, mogla bi bit važna gipoteza. Vse dalše jest fantastika, idealizm i metafizika, objektivno reakcionna, bez vzgleda na to, čto straniki meždunarodnich jezikov mogu bit osobito dobri ludi i dobri komunisti. No, im problem ne jest toliko jasni. I jasni im ne može bit, ibo v oblasti rešenija problema meždunarodnich

Kaj unu el realaj metodoj, kiel faciligi interkompreniĝon inter laboristoj de diversaj nacioj kaj lingvoj estas: lerni la plej gravajn realajn lingvojn, kiel ekzemple: lingvon rusan, lingvon anglan, hispanan, hindan, ĉinan, araban, japanan, malajan. Tio signifas, ke en kondiĉoj de socia vivo de nia etapo estas realisma, ke la amasoj lernu tiujn ĉefajn lingvojn de la tuta mondo. Ĉio, kio reale helpas al tiu celo, estas progresema, kaj ĉio, kio malhelpas realigon de tiu celo, estas reakcia kaj objektive direktita kontraŭ la celoj de proletaro. Favorantoj de artefaritaj lingvoj (volapukistoj, esperantistoj, idistoj) diros: lernado de artefaritaj lingvoj helpas al la proletaro, ĉar tiuj lingvoj estas reflekto de vivaj lingvoj, ili estas kombinaĵoj de elementoj de tiuj lingvoj. Sed klaras, ke scienca vidpunkto de la mondo de komunisma partio devas diri: *ne ĉiu-ajn* esprimo de vivaj lingvoj estas utila el materialisma kaj dialektika vidpunkto. Tia esprimo de la realaĵo de vivaj lingvoj, kiu havas trajtojn de *metafiziko, vulgarigo, skemigo kaj idealismo*, ne povas esti akceptata kiel solvo de la problemo.

Kaj kiam klaras, ke en malproksimaj perspektivoj de evoluo de homaro estas ununura lingvo de la tuta mondo ege grava hipotezo, same klaras, ke en kondiĉoj de nia socia realaĵo ne ekzistas kondiĉoj por ununura tia lingvo. Ĉar estas fakto, ke ĝermanaj, slavaj, hindo-iranaj lingvoj havas komunan originon el lingvo prahindeŭropa, klaras, ke tiuj lingvaj grupoj estas tiom diferencaj en realo, ke ankaŭ paroli pri ununura lingvo por ĉiuj hindo-eŭropanoj estas nur fantazio. Sed oni vidas, ke reciproka komprenebleco de slavaj lingvoj inter si, Romanaj lingvoj inter si jam estas grava fakto, kiu povus havi gravan signifon en solvo de la problemo de interkompreniĝo de nacioj kaj proletaroj. Se eblus, ke la reflekto de tiuj inter si parencaj lingvoj estus scienca kaj ne fantazia, se tiu sintezo de vivaj lingvoj estus ege taŭga rimedo por faciligi scipovon de vivaj lingvoj – ĉar nur tio povas esti celo de nia strebado – tiu hipotezo de zonaj lingvoj *normigitaj, kodigitaj, science kaj estetike prilaboritaj*, povus esti grava hipotezo. Ĉio alia estas fantaziaĵo, idealismo kaj metafiziko, objektive reakcia, senkonsidere al tio, ke favorantoj de artefaritaj lingvoj povas esti persone bonaj homoj kaj bonaj komunistoj. Sed por ili la problemo nur ankoraŭ ne estas klara. Kaj ĝi ne povas esti klara por ili, ĉar en la kampo de solvo

jezikov ešte nigda nebila izrabotana teorija, jež bi razrešila protivopoložnosti v suglasiju s nagledami jezikoznanija i politiki komunisticki partiji, dialektickego materializma.

Dumame, čto izrabotat taku teroriju v uslovijach našego naživanija dlužno, potrebno. Urobit problem jasnim, eto značilo bi fundovat usilije o meždunarodni jezik naučno, prakticki i v suglasiju s interesami proletarijata vsegomira, s zadanijami kulturni revoluciji itd.
Dialekticko-materialisticka teorija razrešenija problema srazumivanija proletarijov vsech stran i zeml dlužna bit izrabotana takim sposobem, da bi bilo jasne, da experimenti s izkustvennimi jezikami kak esperanto su toliko otrazem usilija alchimistov v oblasti jezikoznanija. Eto znači, da tože eti alchimisti dobili istich uspjechov, no, dlužno toliko jasno objavit, gde i v kakich oblastich ich robota ima značenije. Dlužno dalše objavit, čto alchimija ne može bit propagovana ot partiji komunistov, kak uže jestvuje nauka – chemija. Dumame, da razrešenije zaklučeno toliko v tom, čto:
a) ves problem bude surovo i važno obsuden iz zrenija zaujmov proletarijatu i jeho borbi s kapitalismem,
b) bude obsuden iz punkta zrenija dialektickego materializma,
c) bude obsuden iz zrenija znanij živich jezikov (jezikoznanija sravnitelnego),
d) objektivno bude studovat danich jezikov izkustenich, iskat vsech objavov i cennosti, jež oni prinosili v elementarnich oblastich.
Eto znači: kriticki prerabotat vse, čto v oblasti meždunarodnich jezikov bilo do tego časa urobeno. Dialekticko-materialisticka teorija može bit toliko rezultatem studija:
a) pozdviženij za meždunarodnij jezik (vsech tendencij, ne toliko esperanta)
b) vsech projektov i teorij o razrešeniju tego problema s usilijem priimat iz vsego vse čto ima racionalne zrno.
Eto, čto urobili v podgotovke izrabotanija naukovego zrenija mira idealisti-dialektici ibo metafisicki materialisti kak Hegel i Feuerbach - možno skazat - urobili v oblasti meždunarodnego jezika dve osobitosti, nemnogo znami. Eto jest profesor Edgar Wahl iz estonski SSR (ergo osobitost iz tabora socialisma) i profesor Dr. Alexander Go-

de problemoj de internaciaj lingvoj ankoraŭ neniam estis prilaborita teorio, kiu solvus antagonismojn en konsento kun opinioj de lingvistiko kaj politiko de komunisma partio, de dialektika materialismo.
Ni kredas, ke ellabori tian teorion en kondiĉoj de nia vivmaniero estas necese, bezonate. Klarigi la problemon, tio signifus fundigi strebojn pri internacia lingvo science, praktike kaj en konsento kun interesoj de proletaro de la tuta mondo, kun taskoj de la kultura revolucio ktp.
Dialektika-materialisma teorio de solvo de problemo de interkompreniĝo de proletaroj el ĉiuj ŝtatoj kaj landoj devas esti ellaborita tiamaniere, ke klaru, ke eksperimentoj kun artefaritaj lingvoj kiel Esperanto estas nur esprimo de strebado de alkemistoj en la kampo de lingvistiko. Tio signifas, ke ankaŭ tiuj alkemistoj atingis certajn sukcesojn, sed necesas nur klarigi, kie kaj en kiuj fakoj ilia laboro gravas. Plue necesas klarigi, ke alkemio ne povas esti propagata per komunisma partio, ĉar jam ekzistas la scienco – kemio. Ni kredas, ke la solvo ankriĝas nur en tio, ke:
a) ĉiu problemo estos grave kaj serioze pritraktata el vidpunkto de interesoj de proletaro kaj ties batalo kontraŭ kapitalismo,
b) ĝi estos pritraktata el vidpunkto de dialektika materialismo,
c) ĝi estos pritraktata el vidpunkto de vivaj lingvoj (kompara lingvistiko),
d) ĝi objektive studos ekzistantajn artefaritajn lingvojn, serĉos ĉiujn eltrovojn kaj valorojn, kiujn ili alportis en elementaraj fakoj.
Tio signifas: kritike reprilabori ĉion, kio en la kampo de internaciaj lingvoj ĝis nun estis farita. Dialektika-materialisma teorio povas esti nur rezulto de studado de:
a) internacilingvaj movadoj (de ĉiuj tendencoj, ne nur de Esperanto)
b) de ĉiuj projektoj kaj teorioj pri solvo de tiu ĉi problemo, kun strebo akcepti el ĉio tion, kio havas racian kernon.

Tion, kion faris en preparo de ellaborigo de scienca mondkoncepto idealistoj-dialektikistoj aŭ metafizikaj materialistoj kiel Hegel kaj Feuerbach – eblas diri – faris en la kampo de internacia lingvo du personecoj, malmulte konataj. Tio estas profesoro Edgar Wahl el la Estona Sovetia Socialisma Respubliko (do personeco el regiono de

de. Prvi izrabotal na osnove 30letni raboti sistem Interlingue i drugi izrabotal s pomaganijem kolektiva učenich sistem Interlingua, jež jest utvrženijem rabot prof. E. Wahla.
Takim sposobem jasno, da razrešenije problemu ne toliko v taboru kapitalizma, no tože v taboru socializma. Oba eti rabotniki bili uže specialistami v znaniju mnoga jezikov (Wahl poznal 30 jezikov) i raboti prof. Dr. Gode bili rezultatem mnoga rabot meždunarodno izvestnich lingvistov kak O. Jespersen, A. Martinet itd.

Eti učeni objavili, čto meždunarodni jezik nemožno *vidumat,* no, toliko *objavit.* V jezikach vzaimno blizkich, kakimi su jeziki romanski i jezik anglicki (v mnoga črtach) jestvuje potencionalno novi jezik, srozumitelni ludim vsech etich nacij. Toliko jest potrebno formulovat jego pravidla, definovat, kodifikovat, standardizovat. Takim sposobem oni surovo otsudili idej univerzalnego jezika za ves mir. Oni načinali rabotat na osnovach jezikov živich i vzaimno pribuznich. Takim sposobem načina se novi put za interlingvistiku (nauku o meždunarodnich jezikach). Okončeni bil period *vidumivanija* jezikov, načinal se period *formulovanija* vzaimnego jezika zonalnego charaktera.
No, surove zabludenije v rabotach etich osnovatelov za dviženije *realističeskich* jezikov zonalnich v etom, čto oni dumali utvorit sintezis jezikov romanskich na osnovach gramatiki anglicki (bolše prof. Wahl, menše prof. Dr. Gode). V etim zaklučena ešte velevažna progreška, ibo takim sposobom romanski jezikovi material na osnovach germanski gramatiki (ibo gramatiki romanskich jezikov, jež ne su tipem, kak jezik francuzski), vznika jezik, jež ne može bit v plnim suglasiju ni s jezikem anglickim, ni s jezikami romanskimi (živimi). Etot fakt pričina lingvistickich nedostatkov i progrešek etich jezikov.
Dalše važne zabluždenije v etim, čto Wahl i Gode dumali, da ich jezik, jež objektivno jest sintezis jezikov anglo-romanskich, ergo, može bit pojiman dobre toliko ludimi tego jezikovo pochodenija (ibo poznali eti jeziki putem studija), oni proglasuju za jedini jezik, jež mog bi prijimat ves mir. Zabludenije v etim faktu, čto izchodi iz gipoteza, čto jezik charaktera i pochodenija anglo-romanskego može bit prijimani vsemi jeziko-

socialismo) kaj profesoro Dr. Alexander Gode. La unua prilaboris surbaze de tridekjara laboro sistemon Interlingue kaj la dua ellaboris helpe de kolektivo de sciencistoj sistemon Interlingua, kiu estas konfirmo de la laboroj de profesoro E. Wahl. Tiamaniere klaras, ke la solvo de la problemo estas ne nur en la regiono de kapitalismo, sed ankaŭ en la regiono de socialismo. Ambaŭ tiuj fakuloj estis jam specialistoj en kono de multaj lingvoj (Wahl konis 30 lingvojn) kaj laboroj de prof. Dr. Gode estis rezultoj de multaj laboroj de internacie konataj lingvistoj kiel O. Jespersen, A. Martinet k.a. .
